INTEGROVANÁ BEZPEČNOSŤ PROSTREDIA • 2023 • INTEGRATED SAFETY OF ENVIRONS
Recenzovaný zborník z XXII.medzinárodnej vedeckej konferencie konanej 21.09.2023 v Bratislave
Proceedings of the 22nd International Scientific Conference, September 21, 2023, Bratislava
Slovak Republic, Edition ESE-65, First Edition, ISBN 978-80-974769-0-8
Slovak Society for Environment • Bratislava • Slovak Republic

OPEN ACCESS Article

# MEDIAJ KAJ SEKURECAJ ASPEKTOJ DE MEDIPROTEKTO - KONFERENCO "INTEGRA MEDIA SEKURECO 2023"

Stano Marček [1]

INTEGRATED SAFETY OF THE ENVIRONS

INTEGRATED SAFETY OF ENVIRONS ´2023

*ANTAŬPAROLO*

[1] Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio ǀ Redaktoro de la revuoj, c*Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell,* Membro de Akademio de Esperanto
@ *Email:* Stano.marcek@gmail.com

•

*Competing interests : The author declare no competing interests.*
*Publisher's Note: Slovak Society for Environment stays neutral with regard to jurisdictional claims in published maps and institutional affiliations. Copyright: © 2023 by the authors.*
*This article is an open access article distributed under the terms and conditions of the Creative Commons Attribution (CC BY) license (https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/)*
*This license allows reusers to distribute, remix, adapt, and build upon the material in any medium or format, so long as attribution is given to the creator. The license allows for commercial use.*
*Review text in the conference proceeding: Contributions published in proceedings were reviewed by members of scientific committee of the conference. For text editing and linguistic contribution corresponding authors.*
*Slovak Society for the Environment ( Slovenská spoločnosť pre životné prostredie ) Bratislava, Slovak Republic*

Malriĉeco, kreskanta loĝantarkresko, malefika uzo de resursoj, altaj niveloj de konsumo, generado de rubo kaj industria poluo, estas kelkaj el la ŝlosilaj faktoroj, kondukantaj al kontinua media degenero. Progreso al daŭrigebla estonteco estas tro malrapida. Pluraj ekonomiaj, juraj, edukaj, informaj, administraj, instituciaj kaj teknikaj iloj estas uzataj por efektivigi la median kaj sekurecan politikon en la praktiko. Estas tendencoj pliigi la diversecon de iloj, bazitaj en ne malgranda mezuro sur la libervolaj agadoj de produktantoj kaj la kreskanta konscio de ĉiuj partoprenantoj.

La homa sano kaj la bonaj vivmediaj kondiĉoj estas proksime ligitaj al la stato de la vivmedio. Bona kvalito de la natura vivmedio disponigas bazajn fontojn, kiaj estas pura aero kaj pura akvo, fekunda tero por nutraĵproduktado, same kiel energio kaj krudmaterialoj por la fabrikindustrio.

Problemoj, ligitaj al la vivvmedio, fariĝis nedisigebla parto de nia ĉiutaga vivo kaj ili estas severa imposto pro la komforto, kiun la plej granda parto de la mondo povas al si permesi. Ĉi tiuj problemoj influas ĉiujn partojn de la vivmedio. Al la ĉefaj vivmediaj problemoj ne nur en Slovakio apartenas la aerpoluado, la rubaĵa kaj akva mastrumadoj kaj la arbarprotektado.

La baza kondiĉo por transiri al la daŭrigebla uzado de la natur-riĉaĵo estas fiksi la ĝustan prezon pro la poluado kaj degenerado de la natura vivmedio, ekz. per eliminado de forcejaj gasoj. Enkalkulo de la prezo pro poluado en la finan prezon kreos instigojn por pli efika produktado, investadon en la

disvolviĝon de novaj teknologioj, per kio samtempe atingiĝos pli granda konkurencikapablo kaj signifaj ŝparoj.

Altigado de la publika konscio pri problemaro de la vivmedia defendado kondukas la publikon ne nur al pli granda kompreno de vivmedia kunteksto de la ekonomia kaj socia vivoj de la socio, sed ankaŭ al pli kvalita decidado la konsumantoj, al jura konscio de la civitanoj kaj sekve al pli alta mediprotekto kaj kvalito de la vivo.

Lastatempe ni povas observi tri ĉefajn tendencojn en regulado de la vivmedio:

- ŝovo de regulado de ordonoj kaj kontroloj al ekonomiaj (libervolaj/teknikaj) instrumentoj, kiuj disponigas stimulojn por la uzantoj elekti optimumajn investojn en protektadon de la vivmedio;
- kreskanta alireblo de informoj pri la mona valoro de vivmediaj kostoj kaj profitoj;
- kreskanta tendenco fiksi vivmediajn celojn en internaciaj forumoj.

Lastatempe sur la kampo de klopodoj pri vivmedia politik-devigo okazis signifa disvastigo en aplikado de spektro de libervolaj vivmediaj aliroj. Montriĝas tendencoj pliigi la diversecon de instrumentoj, bazitaj en granda mezuro sur la volontulaj agadoj de produktantoj kaj la kreskanta konscio de ĉiuj partoprenantoj sur la kampo de la vivmediaj protektado kaj kreado. Pluraj procedoj estas iom post iom standardigataj. Samtempe kun ilia praktika ekspansio, ilia esplorado komenciĝis, temigante ne nur la studon de la teoriaj aspektoj, sed ankaŭ la ĝeneraligo de praktikaj spertoj, akiritaj de individuaj studoj.

Kreskis ankaŭ graveco kaj nombro da gravaj interagoj inter la ekonomia kaj vivmedia reguligoj en la sekvaj sektoroj:

- vivmediaj reguladoj povas esti kritika determinanto de investaj programoj;
- la procedo de fiksado de tarifoj povas influi la motivadon al la reguligata socio reagi al ekonomiaj instrumentoj;
- la ekonomia regulanto povas havi aparte bonajn antaŭsupozojn por okupiĝi pri certaj vivmediaj problemoj, specifaj por la konkreta sektoro.

La reciproka interago inter la ekonomia kaj vivmedia reguladoj elvokas plurajn problemojn. Malgraŭ la tendenco de uzado de ekonomiaj stimuloj en regulado de la vivmedio, plu superregas direktado kaj kontrolo, en kiuj la registaro fiksas normojn kaj sankcian sistemon por plenumi la normojn.

La problemaro de vivmediaj ŝarĝoj estas traktata prioritate, por plibonigi la staton de la damaĝitaj kaj endanĝerigitaj komponantoj de la vivmedio, kiel rezulto de la longdaŭra homa aktiveco, kaj samtempe por krei kondiĉojn por laŭpaŝa eliminado de kontaminataj fontoj de subteraj akvo, grundo kaj rokminaĵo, kaj resanigo de poluitaj komponantoj de la vivmedio. La ĉefa celo dume estas atingi altnivelan kvaliton de la homa sano kaj de individuaj komponantoj de la vivmedio, kaj al ili rilatan pli altan nivelon de la vivokvalito.

Estas multaj katastrofoj, kies riskoj ne estas neglekteblaj. Kelkaj el la katastrofoj havas altan potencialon por detrui la teritorion, ne nur ĝiajn loĝantojn, sed ankaŭ la landon, ekosistemojn kaj homajn setlejojn. Tial la institucioj, kiuj organizas la vivon de la homa socio, devas ĝuste administri kaj gvidi la sekurecon de la soci-ekonomiaj agadoj en la teritorio, precipe el la vidpunkto de vivmedia protektado de la socio.

Pluraj ekonomiaj, juraj, edukaj, informaj, administraj, instituciaj kaj teknikaj instrumentoj estas uzataj por efektivigi la median kaj sekurecan politikojn en la praktiko. La celo de la konferenco "Integra Media Sekureco 2023" estis disponigi taŭgan platformon por informado de la profesia kaj scienca publikoj, reprezentantoj de loka registaro kaj ŝtata administrado, interŝanĝon de spertoj kaj prezenton de novaj rezultoj en problemaro de la sekureco de la vivmedio.